# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo decembro 2021**


## ZAMENHOFA TAGO DENOVE ĈEESTA

Ĉi-jare finfine la Zamenhofa Tago povos okazi denove ĉeeste. Ni planis rendevuon la sabaton 11an de decembro, ekde la 11a horo.

Ni vojaĝos al Fuenlabrado, kaj povos ĝui tradician fratan renkonton en la sidejo de la Fuenlabrada Esperanto-Ligo kiu situas en strato Creta numero 2. La loko estas facile alirebla el la ĉefurbo aŭ aliaj lokoj, ĉar ĝi troviĝas je 300 m de la haltejo "Fuenlabrada Central" de trajno kaj metroo. La loko troviĝas ene de la C.E.P.A. (centro por edukado de plenkreskuloj) "Paulo Freire" kiu konsistas el kvin konstruaĵoj. Oni devas eniri ĉe Av. De las Naciones, tra la pasejo por aŭtoj kiu kondukas al interna parkejo. Ĉiukaze, je la 10:45 iu kun verda flago gvidos homojn el la stacio ĝis la sidejo. Notu la kontaktan telefonnumeron: 647669726.

La programo estos detaligita en la venontaj tagoj; se vi mem deziras kontribui, skribu al madrid@esperanto.es.

Krome, oni planas komunan tagmanĝon. Eblas elekti ĉe la restoracio inter la pladoj proponitaj kiel tagmenuo. Ankaŭ eblas mendi iun pli multekostan, sed antaŭe kaj kvarope. GRAVE: se vi intencas partopreni la tagmanĝon, bv. informi per la sama retadreso madrid@esperanto.es, por kalkuli kiom da homoj partoprenos kaj la detalojn pri menuoj.




Pliaj informoj venos baldaŭ, ĉefe pri programo. Konsultu dum venontaj tagoj en la adresoj: https://eventaservo.org/e/madridazamenhofa2021 kaj http://esperanto.es/mel/index.php/54.

Ne mankos aliaj festadoj, multaj virtualaj dum tiuj datoj, inkluzive de publika rendevuo de la Akademio de Esperanto. Vi povasscii pri ili en la retejo: https://eventaservo.org.

## KURSOJ

La komenco de la ĉeestaj kursoj prokrastiĝos ĝis la monato januaro, kaj en Madrido kaj en Fuenlabrado. Do, se vi konas interesiton, ankoraŭ restas tempo por aliĝi. Vi povas kontakti respektive kun la adresoj: andyflorida@hotmail.es kaj esperantoesdetodos@gmail.com.

## AMPLEKSA RENDEVUO EN "ESPERANTO"



Ni anoncis ke la novembra renkontiĝo okazos en trinkejo (polpejo) en la strato Esperanto de Madrido, kaj la provo evidentiĝis tute sukcesa. Vidu la apudan foton por iom gustumi la etoson.

Ni ĝuis la ĉeeston de Albert Stalin Garrido, juna filipina aktivisto, respondeculo de la Filipina Esperanto-Junularo kaj vicprezidanto de TEJO, kiu dum la tuta akademia jaro troviĝos en Madrido en studa programo. Ni certe havos ŝancon rendevui kun li en pluaj okazoj.

Ankaŭ ĉeestis du aliaj ekstermadridaj vizitantoj, Jean el Francio kaj Antonio, el Ĥaeno.

Krome, nia amikino Laura Higuera parolis pri siaj esperantaj vojaĝoj kaj donacis kaj subskribis ekzemplerojn de sia romano "El ángel negro".

Pro la proksimeco de la Zamenhofa Festo ĉimonate ni ne organizos unuasabatan renkontiĝon. Tamen, ni atendas viziton de sudamerika samideano dum la decembra festo-ponto; kaze ke eblos organizi renkonton, ni anoncos per la kutimaj kanaloj.

## LORCA EN VIRTUALA BIBLIOTEKO CERVANTES

La verko de Federico García Lorca, "Cigana Romancaro", kiun Hispana Esperanto-Federacio reeldonis en bita formato, okaze de la 50-jariĝo de ĝia unua publikigo, kiel omaĝo al la poeto, nun troviĝas en la prestiĝa Biblioteca Virtual Miguel de Cervantes.

Vi povas aliri la informon, kun ligoj al la versioj en formatoj epub kaj pdf, en la adreso: http://blog.cervantesvirtual.com/federico-garcia-lorca-en-esperanto/.

Memoru ke la verko troviĝas ankaŭ en la retejo de la Bitoteko de HEF, en la adreso https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/6429, kaj ke HEF produktis ankaŭ memor-karton kun ties enhavo, kiun vi povas mendi en la sidejo.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

**FELIĈAJN FESTOJN KAJ PROSPERAN JARŜANĜON AL ĈIUJ NIAJ AMIKOJ!**

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com